# TEJO-aktuale: numero 317, 2012-06

## TEJO-rabato por sukcesaj KER-ekzamenoj

Karaj ekzameniĝontoj de la KER-ekzameno! Kiel ni jam antaŭe komunikis, kaze de sukcesa ekzameno je nivelo C1, TEJO redonas al siaj membroj7,50 eŭrojn de la ekzameno-kostoj aŭ 15 eŭrojn se estas kompleksa ekzameno, do skriba kaj parola. Se vi ekzameniĝas la 9an de junio kadre de la Tutmonda skriba sesio, kontaktu Petra Smidéliusz ĉe petra ĉe tejo.org ĝis la 8a de junio por kandidatiĝi por la subvencio. Pliaj informoj pri KER-ekzamenoj troveblas ĉe http://edukado.net/ekzamenoj/ker.

## ĜISDATIGO DE LA RETPOŜTABONANTO-LISTO DE TEJO-AKTUALE FINITA

Karaj retpoŝtaj abonantoj de TA,

La ĝisdatigo estas finita, dankon por viaj reagoj kaj via kunlaboro.

Kore, Julia NOE,

redaktorino de TEJO-aktuale

## Lingva Festivalo en Ĉeboksary/Ŝupaŝkar, 20an kaj la 21an de oktobro 2012

Mi estas Massimo Ripani kaj mi estas komitatano de Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (http://www.esperanto21.org). Ĉi-jare nia Lingva Festivalo (http://www.lingvafestivalo.org) okazos la 20an kaj la 21an de oktobro 2012 kaj en la antaŭaj tagoj ni vizitos lernejojn de vilaĝoj apud Ĉeboksary/Ŝupaŝkar, ĉefurbo de nia respubliko. Ni ne povas pagi vian flug-bileton, sed ni volonte gastigos kaj manĝigos vin ĉe ni. Se vi pretas partopreni, skribu al info ĉe esperanto21.org.

Amike kaj samideane, Massimo

## [Esperanto] Diskonigita la rezulto de la konkurso Date With History

La venkinto estis Brittany el NovZelando. Bedaŭrinde ne okazos ĉi foje ke esperanto estos parolata al la ŝtatestroj, sed la rezultoj estis pozitivaj al ni, ĉar gravuloj eksciis pri esperanto aŭ ekrespektis ĝin. Dankon al ĉiuj kiuj voĉdonis kaj varbis por meti min en la finalo.

Amike, Rafael.

## [Karavano al FESTO] Jen la planitaj trairotaj urboj:

*Malsukcesa elŝuto.*

## "Eo-Info" - Invito kunlabori

Lastatempe mi kaj aliaj informemuloj laboras pri projekto nomata "Eo-Info". En la unua fazo de la projekto temas pri krei eo-informpaĝaron multlingvan kaj modernan. Volonte rigardu http://vikio.ikso.net/HokanX/EoInfo (zamenhof 1859) por vidi kia aspektos la paĝaro.

En tiu vikipaĝo ankaŭ estas informoj pri kiel aliĝi al la projekto se vi ŝatus kunlabori pri ĝi (aŭ simple sekvi kio okazas en ĝi). La laboro pri la aspekto kaj la strukturo de la paĝaro estas pli malpli finfarita. Nun sekvos verkado de enhavo kaj kolektado de bonaj (belaj, viglaj aŭ amuzaj) eo-fotoj. Estus granda helpo se vi sendus viajn plej ŝatatajn eo-fotojn al mi, kun permeso uzi ilin en la projekto!

Post monato aŭ du eblos ektraduki enhavotekstojn. Volonte skribu al mi se vi pensas ke vi ŝatus kunlabori pri tio.

Projektinvite, Hokan, hokan ĉe ikso.net

## EKSPOZICIO KAJ SIMPOZIO EN BAVARA ŜTATA BIBLIOTEKO, Mukeno, Germanio 14a kaj 15a de Junio 2012

Okaze de la 100-a datreveno de la morto de Prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912), la aŭtoro de Volapük, kaj la 125-jara ekzisto de Esperanto, Bavara Ŝtata Biblioteko (BŜB) en Munkeno aranĝos ekspozicion kun la titolo „Inter utopio kaj realo: konstruitaj lingvoj en globalizita mondo“. BŜB apartenas al la plej grandaj universalaj bibliotekoj de la mondo kaj ĝi posedas unu el la plej riĉaj planlingvaj sortimentoj.

La solena malfermo de la ekspozicio okazos ĵaŭdon, la 14-an de junio je 19h00 en la biblioteko (Ludwigstrasse 16, Munkeno), fare de d-ro Rolf Griebel, ĝenerala direktoro de BŜB. La biblioteka koruso prezentos kantojn en Volapük kaj Esperanto. Enkonduka referato pritraktos la temon „Kio estas kaj kiucele oni okupiĝas pri interlingvistiko?“

Aliĝoj okazu jene:

1) por la solena malfermo: veranstaltungen ĉe bsb-muenchen.de;

2) por la simpozio: baes.sekretariat ĉe bsb-muenchen.de.

En la reto samtempe okazos virtuala ekspozicio.

Detaloj en la germana kaj en Esperanto: http://www.bsb-muenchen.de/Einzeldarstellung.403+M562baccbf1d.0.html

Detaloj en la angla: http://www.bsb-muenchen.de/Detailed-information.403+M55ef4ef2898.0.html

## Aŭgusta oferto por junaj familioj kun infanoj : Pupteatro kaj Gitaro

Pupteatro, por infanoj junaj ĝis plenkreskaj, kun Christoph Frank

Gitara improvizado, por junuloj, kun Thierry Pouplin

Krome aliaj aktivaĵoj, E-kursoj ktp, vegetara manĝo, tendumado...

de 11-a ĝis 20-a de aŭgusto 2012 en la franca kastelo Greziljono, kie pasintjare okazis la fama FESTO.

Pliaj detaloj en http://www.gresillon.org/s4

Tuta somera programo en http://www.gresillon.org/somero

Kore salutas, Kulturdomo de Esperanto

## Florgvidado en la ĉirkaŭaĵo de Immendingen – Bachzimmern, Germanio, 17a de junio 2012

La Esperanto-grupo Schwarzwald-Baar-Heuberg (La Fiŝo) invitas vin al la ĉijara florgvidado en Immendingen - Bachzimmern. La vilaĝeto Bachzimmern situas en la regiono „Orienta Baar“. Ni renkontiĝos Dimanĉon la 17an de Junio je la 3a horo posttagmeze ĉe la parkejo de la loka gastejo „Zur Flamme“. Je la 5a horo ni iros en la gastejon „Zur Flamme“ por trankvile fini la dimanĉan posttagmezon. Esperanto-amikoj, kiuj ne povas kunesti la florgvidadon, estas invitataj kunesti la gajan rondon de Esperanto-amikoj en la gastejo ekde la 5a horo posttagmeze. Se vi volas aliĝi al la interesa florgvidado, tiam bonvolu respondi al f.vogler ĉe email.de.

### Venontaj renkontiĝoj

Junulara Semajnfino, Liverpool, Britio, 22a de junio 2012 http://www.jeb.org.uk/lpool2012eo
Internaciisma Renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Asocio kaj Kataluna Esperanto-Junularo, Canet de Mar, Hispanio, 29an de junio ĝis la 1an de julio http://www.esperanto.cat/ir2012
NASK 2012, Dallas, Teksaso, Usono, 25 de junio ĝis 4a de julio http://esperanto.org/nask
Roskilde Festivalo 2012, Roskilde, Danio, 30-a de junio ĝis 9-a de julio 2012 http://roskilde.festoklubo.dk/
TEATRO-STAĜO, Minsko, Belarusio, 7-a ĝis la 17-a de julio 2012 http://www.morgaulaprintempo.eu
SOMERE, Jünkerath, Eifel, Germanio, 13-a ĝis 21-a de julio 2012 http://www.esperantoland.org/somere/
Somera Esperanto-Renkontiĝo, Tokio, Japanio, 13a ĝis 16a de Julio 2012
http://esperantokunveno.wordpress.com/aligilo/
KEFeto Stafeto, Kopenhago, Danio, 10a de julio 2012 http://kef10.saluton.dk/
OSIEK-konferenco, Svitavy, Ĉeĥio, 14-a ĝis 20-a de julio, Petro Chrdle, chrdle ĉe kava-pech.cz
9-a kongreso de EEU 2012, Galivo, Irlando, 16a ĝis 20a de julio 2012, http://eeu-kongreso.webnode.com/
"Renkontiĝo de Amikoj", Bajkalo, Rusio, 17a ĝis 25a de julio 2012, http://ra.nsk.ru/RA-7/
ILEI-KONFERENCO, Ĉinio , 20-26 julio 2012 http://ilei.info
Somera Esperanto-Studado (SES-2012), Nitra, Slovakio, 21-a ĝis 29-a de julio 2012
http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/2012/
Art-amatora semajno kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj, Esperanto-kastelo Greziljono, Francio, 21a ĝis 28a de julio http://gresillon.org/s1
UK, Hanojo, Vjetnamio, 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012 http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=413#2
Alternativa Semajno kun verd-politika seminario de AVE, Greziljono, Francio, 28a de julio ĝis 4a de aŭgusto 2012
http://gresillon.org/s2
IJS 2012, Neninsulo, Hungario, 30a de julio ĝis 5a de aŭgusto 2012 http://www.ijs.hu/eo
Ecotopia 2012, Lausitz, Germanio, 1-an ĝis 26-an de aŭgusto http://ecotopia2010.org aŭ Ronaldo N. ro-esp ĉe dds.nl
Turisma kultura semajno, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze, Esperanto-kastelo Greziljono, Francio, 4a ĝis 11a de aŭgusto http://gresillon.org/s3
Klimat- kaj Energi-tendaro, Lausitz, Germanio, 12-an ĝis 19-an de aŭgusto http://ecotopia2010.org aŭ kontaktu Ronaldo N. ro-esp ĉe dds.nl
IJK 2012, Hanojo, Vjetnamio, 5a ĝis 12a de aŭgusto 2012 http://www.tejo.org/ijk
Pupteatra festivalo por infanoj, junuloj, familioj, Esperanto-kastelo Greziljono, Francio, 11a ĝis 20a de aŭgusto
http://gresillon.org/s4
85-a kongreso de SAT, Jalto, Ukrainio , 11a ĝis 18a de aŭgusto 2012 http://satesperanto.org/Bonvenon.html
Instruista trejnado, Sicilio, Italujo, 16a ĝis la 25a de aŭgusto 2012 http://edukado.net/novajhoj?id=205
FESTO 2012, Métabief, Francio, 17a ĝis 24a de aŭgusto 2012 http://festo2012.esperanto-jeunes.org
79a Kongreso de Esperanto, Mazaradelvalo, Sicilujo, Italujo, 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012
http://kongreso.esperanto.it/
Aŭtuna BARO 2012: 6-a ĝis 9-a de septembro 2012 http://www.krokodilo.de/baro/baro.php
2a Esperantista Migrado Aŭtuna (EMA), Kaub, Germanio, 30a de septembro - 5a de oktobro 2012
http://www.esperanto.de/gea/ema2012.html
Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu